

PRI UZO DE PREPOZICIO PO

(S. Toronyai, HÖDMEZÖVÁSÁRHELY, Hungario)

Prepozicio po indikas distribuon. Ekzistas simpla kaj duobla distribuo.

Simplaj distribuoj:

- 1./ Alveni po unu, po tri, po cent ...
- 2./ Preni medikamenton po dek gutoj, po (unu) guto, po kulero. Aĉeti po skatolo.
- 3./ Aĉeti poskatole, pogrande, pomalgrande. Akiri poiomete.

Ekzemplo por duobla distribuo:

- 4./ Doni po tri pomojn al po du infanoj

Oni kreas grupojn el infanoj. Ĉiu grupo konsistas el du infanoj. Poste oni kreas grupojn el pomoj. Ĉiu grupo enhavas tri pomojn. Du infanoj kreas unu bazgrupon, unu bazdistribuaĵon. Tri pomoj kreas unu duarangan grupon, unu sekundaran distribuaĵon. La grandeco de sekundara distribuaĵo dependas de grandeco de bazdistribuaĵo. La sekundara distribuaĵo pleje rolas en akuzativo aŭ en nominativo.

Sed oni ne kutimas uzi la prepozicion antaŭ ambaŭ distribuaĵoj. Ĝenerale nur antaŭ la bazdistribuaĵo:

- 5./ Doni tri pomojn al po du infanoj

Oni povas meti la prepozicion antaŭ la sekundaran distribuaĵon:

- 6./ Doni po tri pomojn al du infanoj. - Sed tio ne estas celeca, ĉar kompletege per artikolo, ĝia signifo estas tute alia (kaj la frazoj 6./ kaj 7./ apenaŭ estas distingeblaj):

- 7./ Doni po tri pomojn al la du infanoj

Ĉi tiu signifas, ke sume estas du infanoj, kaj ĉiu el ili ricevas tri pomojn. (Vidu 10./)

Kio estas la situacio, se la bazdistribuaĵo enhavas nur unu unuon? Laŭ 5./ estus:

8./ Doni tri pomojn al po (unu) infano.

Sed Zamenhof anstataŭ "po unu" uzis la vorton "ĉiu":

9./ Doni tri pomojn al ĉiu infano.

Aŭ laŭ 6./ aŭ laŭ 7./:

10./ Doni po tri pomojn al (la) infanoj

Aŭ:

11./ Doni po tri pomoj al ĉiu infano

Zamenhof pleje forlasis la signon de akuzativo. (Adverba po-esprimo)

El la uzmaniero de Zamenhof oni konkludis, ke la formo 8./ ne estas bona. Eĉ Akademio malkonsilas la uzon de po ankaŭ en tiaj esprimoj: km/h, kp/cm², kg/dm³ ktp. Anstataŭ po proponas uzi la prepoziciojn: en, je, por, sur aŭ adverbos: ĉiuj en horo, aŭ hore; cent kp-oj sur cm² ktp.

Sed en la matematiko, fiziko kaj tekniko ekzistas tiaj esprimoj: m/sek², eĉ multe pli komplikaj. Ĉe tiuj, maksimume la prepozicio je estus uzebla. Sed la praktiko ne ŝatas tiun sensignifan vorton, ne vastigas ĝian uzon, kontraŭe pli kaj pli malvastigas.

Internacia kutimo, normo, regulo, ke la matematikistoj, fizikistoj, inĝenieroj metas la prepozicion (per aŭ pro) antaŭ la bazdistribuaĵon. Kaj ĉiam m-tiun prepozicion uzas. Ne elektas inter -e, en, je, sur, por (pli ĝuste inter ties naciaj adekvataj). Tiu kutimo estas tiom internacia, estas tiom en la "sango" de sciencistoj, teknikistoj, ke nenia malkonsilo de Akademio povas ŝanĝi tion. Eĉ la plej logike kaj simple estas meti la prepozicion po antaŭ la bazdistribuaĵon. (Tiel ankaŭ la 4. - 11. punktoj estus simpligeblaj je unu kiel en la scienco).

Tiutempe Akademio malkonsilis la uzon de formo Anglio, Hungario, Italio, Bulgario ktp. Tiu malkonsilo iĝis senrezulta. Se multaj sciencistoj, teknikistoj uzus aŭ uzos Esperanton, ankaŭ ĉi tiu malkonsilo iĝus aŭ iĝos senrezulta. Ĉi tiu decido eble nur malhelpas la populariĝon de Esperanto en la scienco.

Se Zamenhof uzis anstataŭ "po unu" la vorton "ĉiu", tio ĉi ne signifas, ke po ne estas uzebla antaŭ "unu", kiel antaŭ bazdistribuaĵo. Nur tio ĉi signifas, ke li tiam ankoraŭ ne sentis la neceson tiel uzi, kiel nun tute internacie oni uzas ĝin en la scienco.